

Heinrich Dippel,  
La koro ĉe l' Rejno

*tradukita de N. N. 16*

En Rejno profunda kaŝiĝas kron'  
Sorĉita el or' kaj juvela ŝton',  
Kaj kiu ĝin levos kun brava kor'-  
Li estos kronata en sama la hor'.  
De l' Belt' ĝis Danubo en land' kiu ajn  
Reganto li estos: la Reĝo de l' Rejn'!

En Rejno profunda kaŝiĝas lir'  
El blanka eburo kaj brilsafir'  
Kaj kiu ĝin levos kun brava kor' -  
Tuj verve li kantos kun fajra fervor'.  
Senmorta li estas en temp' kiu ajn:  
La Bardo estonta, la Bardo de l' Rejn'!

Ĉe Rejno post verdaj vinbranĉoj jen  
Dometo sin kaŝas kun gajmien'.<sup>2</sup>  
Enloĝas knabino kun virga kor',  
Je virto ja riĉa, malriĉa je or'.  
Se virgan ĉi koron akirus mi,  
Mi donus la kronon, la liron por ĝi!

*Traduko de la Germana poemo "Das Herz am Rhein" de HEINRICH DIPPEL (\*1825 - †1870) en Esperanton de N. N. 16 en 1932-08-01.*

*Arg-496-969 (2009-12-02 13:19:24)*

*El: Heroldo de Esperanto, Köln, Germanio. Speciala numero, 13-a jarkolekto, 1-an de aŭgusto 1932. Redaktoroj: Teo Jung/Joseph Ferdinand Berger.*

*Vidu ankaŭ la retejon <http://www.literaturo.dk/rejno.htm>, kiun verkis s-ro Lars Kromann, Stenbrydervej 6, Værløse, DK-4640 Fakse, Danujo.*

*Mi, Manfred Retzlaff, proponas alian traduk-version de la unuaj du linioj de la tria strofo; ĉar mi pensas, ke la vortoj "kun gajmien" ne bone konvenas al dometo. Mi aldonas mian ŝanĝo-proponon en piednoto.*

---

<sup>2</sup>aŭ eble pli bone:

Mi konas dometon en verda ĝarden'  
Kaŝitan malantaŭ vit-branĉoj jen.